



PILO-PRESS

Internacia
Informservo

N-ro 28/77 - 14 jul 1977

Aperas ĉiusemajne

Pilo-Press

Jara abono

30,- GM

=====

Eldonanto/Herausgeber:

Ludwig Pickel

Postfach 2113

D-85 Nürnberg 1

Tel. (0911) 46 36 49; 51 42 69

La rajto je komunikado - Temo de la Rejkjavika UK

Rotterdam/Rejkjaviko (pp) - La Kongresa Libro de la 62-a Universala Esperanto-Kongreso, kiu ĵus aperis, entenas enkondukan artikolon en la kongresan temon "La rajto je komunikado" plume de la prezidanto de UEA, d-ro Humphrey Tonkin. El tiu artikolo ni citas la finajn alineojn:

"Fine, do, ni povas resumi la ĉefajn aspektojn de la rajto je komunikado en la kunteksto de la sekvaj demandoj:

1. Kiuj estas la terenoj de homa aktiveco, kie la bezono de tiu rajto estas plej forte sentata?
2. Kiel konfliktaĵoj bezonoj inter individuoj, inter komunumoj aŭ inter individuo kaj kolektivo kunpuŝiĝas ĉe tiu rajto, aŭ limigas ĝian aplikeblon?
3. Kiuj estas lingvaj dimensioj de la Rajto je Komunikado, kaj kiel la manko de komuna lingvo malhelpas la aplikadon de tiu rajto?
4. Kiujn paŝojn oni bezonas por esprimi la bezonojn atenti tiujn lingvaj dimensiojn kaj solvi la problemojn tiel difinitajn, kie taŭge, per la Internacia Lingvo Esperanto? Kiuj estas la fortroj kaj limoj de tia solvo?

Tiu estas iom granda tasko por unusola kongreso, kvankam ja temas pri kongreso sen propraj lingvaj problemoj. Sed la kontribuon de parolantoj de Esperanto al tiu gravega debato oni ne povas tro forte substreki, nek oni povas tro emfazi ĝian urĝon."

La kongreslibro entenas ĉiujn necesajn informojn pri la kongresa programo, la salutvorton de la Alta Protektanto, Kristján Eldjárn, prezidento de Islando, artikolojn pri la historio de Islando kaj la islanda lingvo, pri Esperanto en Islando kaj pri Thórberger Thórdarson, unu el islandaj Esperanto-pioniroj (1889-1974) k.a.

KELI-Kongreso en Edinburgo

Edinburgo (pp) - La 29-a Internacia Kongreso de Kristana Esperantista Ligo Internacia (KELI) okazos de la 21-a - 30-a de julio en Edinburgo, Skotlando. La kongresa temo estas: Popolo propra al Dio. Ĵaŭde, la 28-an de julio, je la 9,30 horo havos lokon la jarkunveno 1977 de KELI.

Filatelaj manifestacioj en San Marino

San Marino (pp) - Dum aŭgusto kaj septembro okazos en San Marino grandaj filatelaj manifestacioj por celebri la unuan centjaran datrevenon de la apero de la unua poŝtmarko de tiu sendependa respubliko. La 1-an de septembro je la 15-a horo renkontiĝos esperantistoj, kiuj interesiĝas por filatelio. Por tiu celo d-ro De Salvo, Romo, akiris de la Direktoro de la Filatela Oficejo de San Marino la permeson, senpage uzi salonegon. Ĉiuj esperantistoj-filatelistoj estas petataj viziti la ekspozicion la 1-an de septembro kaj ĉeesti la esperantistan kunvenon. Tiamaniere Esperanto estos oficiale enŝovita en la manifestacioj. Oni skribu al la Organiza Komitato (Presso l'Ufficio Filatelico della Repubblica Di San Marino) petante kopiojn de la programo kaj rilatante al Esperanto.

La Chaux-de-Fonds, 1977.07.09

Estimata sinjoro,

En la N-ro 24/77 de "Pilo-Press", en la raporto pri Svisa Kurtonda Radio, vi skribas: "S-ro A. Gacond prelegis denove pri 'Esperanto kaj Interlingua'. Amika demando: Ĉu vere tiu temo interesas la plimulton de la aŭskultantoj?"

Eble ne la plimulto interesiĝas, sed almenaŭ forta malplimulto devus interesiĝi. Mi aludas la esperantistojn, kiuj loĝas en landoj, kie la interlingua-anoj aktivis. Tiuj lastaj ne estas multnombraj (en Svislando verŝajne ne dek!), sed kelkaj faras sian tutan eblon por kontraŭstari al esperanto, kaj tio per plej falsaj kaj mensogaj argumentoj! Sama problemo en Francujo, kie la ĉefgvidanto de la interlingua-anoj postulegis sian aliĝon al la internacia renkontiĝo RIDEF en Portugalio por iri vendi tien sian "varon". Mi devis sendi al la organizantoj de la RIDEF nian broŝuron "Esperanto et Interlingua" (kiu estos baldaŭ liverebla en esperanto). Tiu broŝuro estis mendita de mi al fakulo, S-ro Edo Bernasconi, post la akraj atakoj de vigla maljuna svisa interlingvano.

Mi opinias do, ke la prelegoj de S-ro Gacond pri tiu temo povos multe utili al multnombraj esperantistoj, kiuj alfrontas tiun problemon.

Sincere via Olivier, sekretario de la Kampanjo "Esperanto en la lernejojn"

Les Hauts-Geneveys, 7.7.1977

Kara Sinjoro,

Sincerajn gratulojn pro la meritita honorigo. Jam de iom da tempo mi regule sekvas viajn inform-organojn, kaj mi miris pro la granda laboro, kiun vi sukcesas fari por Esperanto.

En unu el la lastaj numeroj de PIIO-PRESS en Esperanto vi esprimas vian miron pri la insisto, laŭ kiu ges-roj Gacond ĉe la Svisa Kurtonda Radio insistas pri Interlingua. Efektive, ni komprenas vian miron. Vi estas germano, kaj en Germanio praktike nur Esperanto ekzistas.

Se vi agus (ni dirus) en Svisio, Francio, Anglio, Svedio, Danlando, Usono, vi scius, ke vi ne povas aperigi artikolon en gazeto pri Esperanto, sen ke amiko Interlingua-isto skribu tuj al la koncerna gazeto, informante la legantojn, ke Interlingua estas mirakla lingvo, ne primitiva kiel Esperanto, farita de lingvistoj, ido de 25-jara ekip(team-)laboro, unuavide komprenebla, kaj nature 100-foje pli facila ol Esperanto.

Laŭ ni, la publiko ne estas kompetenta juĝi pri Esperanto aŭ pri Interlingua, kaj pro tio, ĉefe en Svisio, oni multe laboras por informi (naci-lingve) pri tiu problemo. Ni akurate informas ankaŭ la esperantistojn, por ke ili sciu, pri kio temas, kaze ke ili foje konfrontiĝos kun tiaj diraĵoj (kaj fakte tio okazas ofte). Tiuj diraĵoj estas eraraj kaj erarigaj, tamen oni devas klare kaj akurate demonstri, kie kaj pro kio ili estas eraraj (ne sufiĉas diri "tio estas malvera").

Tial en Svisio lastatempe aperis kajero franclingva de Edo Bernasconi "Esperanto et Interlingua". La sama eldonejo (Kultura Centro Esperantista) eldonos verŝajne en novembro 1977 libron pri la temo. Temas pri la esperantlingva 170-paĝa libro de Edo Bernasconi "Esperanto aŭ Interlingua", kie troveblas ĉio sciinda pri Interlingua kaj pri Esperanto (en komparo).

Povas esti, ke en Germanio tia libro ne tro vendiĝos ĉar ne ekzistas Interlingua-anoj, sed mi certas, ke ne nur svisoj aĉetos ĝin, ĉar Interlingua-isto ekzistas ne nur en Svisio.

Opinioj de legantoj (daŭrigo)

Pro tio mi opinias, ke la klariglaboro de ges-roj Gacond ĉe la Radio estas salutinda. Ĝi eble ne korespondas al faktaj bezonoj en Germanio, sed korespondas al faktaj bezonoj alilande.

Sincere via Tazio Carlevaro (CH-2208 Les Hauts-Geneveys)

Noto de Pilo-Press

PILO-PRESS volonte aperigas ankaŭ opiniojn de aliaj legantoj-aŭskultantoj pri tiu temo.

Esperanto ĉe Regiona Radio "Friulo Julia-Venecio"

Triesto (pp/tea) - Antaŭ pli ol unu jaro aperis en Italio, nova leĝo kiu donas al diversaj asocioj (kulturaj, religiaj, politikaj ktp.) la eblon utiligi radio- aŭ televid-staciojn, laŭ difinita regularo. Televidon povas utiligi asocioj je nacia nivelo (fakte la Itala Esperanto-Federacio jam dissendis sian programon televide); radion povas utiligi asocioj laŭ regiona nivelo.

La Triesta Esperanto-Asocio longe laboris por ekspluati tiun avantaĝan propagandilon kaj sin prezentos la 23-an de julio, ĉe la regiona radio, por dissendi sian dekminutan (la maksimuman tempon permesitan) programon. Estos pritraktata jena temo: "La lingva problemo en la mondo".

La esperanta radiofonio

Rejkjaviko (pp) - Kadre de la Universala Esperanto-Kongreso en Rejkjaviko okazos vendrede, la 5-an de aŭgusto, de la 9-a ĝis la 10,15 h kunsido pri la temo "Komunikado en la Esperanto-movado". Unu laborgrupo sub gvido de Renato Corsetti diskutos ankaŭ pri la temo "La esperanta radiofonio".

Ampleksa analizo de la fenomeno "Esperanto en radio"

Romo (pp) - D-ro Antonio De Salvo, la redaktoro de la Esperanto-elsendoj de Radio Roma, verkis 7-paĝan analizon de la nuntempaj Esperanto-elsendoj. Ne eblas kadre de PILO-PRESS publikigi la kompletan tekston. Ĝi aperos en unu numero de Eŭropa Esperanto-Revuo. La aŭtoro trafas priskribas la nunan situacion de la Esperanto-elsendoj kaj analizas ankaŭ la sintenon de la esperantistoj al fenomeno "Esperanto en radio". Kvankam oni povus diskuti pri unuopaj konstatoj, sed principe oni povas konsenti al la eldiroj kaj konkludoj faritaj de spertulo kaj fakulo.

Hodiaŭ ni nur publikigas kelkajn mallongajn citaĵojn:

"Oni aldonu, ke la insista prezentado - fare de la Esperantistoj - de la Esperantlingvaj elsendoj kiel principa agnosko de la internacia lingvo fare de oficialaj instancoj, montras, laŭ mi, komplekson de malsupereco, kiun la Esperantistoj devas forlasi: Esperanto ne estas valora, ĉar ĝi estas uzata, sed ĝi estas uzata, ĉar ĝi estas valora!..."

"La erara opinio pri la rolo de Esperanto en Radio kaŭzas, ke multaj Esperantistoj miras kaj eĉ koleras, ke la stacioj elsendas programojn ankaŭ pri aliaj temoj krom Esperanto; kaj tion ili ankaŭ skribas, kaj eĉ en akra maniero!..."

"Resume: la radiostacioj, kiuj elsendas en Esperanto, tion faras por propraj celoj; la Esperantistoj ricevas avantaĝon el tiuj elsendoj, ĉar ili prezentas modelon de parolata Esperanto kaj ekzemplon de apliko de la internacia lingvo en ĉiutaga vivo; la Esperantistoj, do, devas subteni la Esperanto-elsendojn, kaj tion ili devas fari proponante al la Radioj la plenumon de iliaj celoj (ĉar la Radioj havas neniun principan intereson pri Esperanto); la Esperantistoj, alivorte, devas montri al la Radioj, ke elsendante en Esperanto oni faras bonan negocon..."

La artikolon devus legi ĉiu esperantisto, kiu serioze interesiĝas pri la temo, speciale ĉiu redaktoro de Esperanto-gazeto.

Mallongaj informoj

Internacia Pilgrimo al Nia Sinjorino de Bona Helpo, Sanktejo situanta en Peruwelz, Belgujo, okazos la 4-an de septembro 1977, sub la temo "La eklezio en la nuna tempo". Interesuloj skribu al Patro L. Bourdon, 7 Av. Salomon, F-59000 Lille.

Al Internacia Tendaro de la 5-a ĝis la 7-a de aŭgusto 1977 invitas Esperanto-Grupo Lohne (loka grupo de Germana Esperanto-Junularo.) Informojn donas: Elisabeth Kuhl, Braonkamp 9, D-2842 Lohne.

Dr. J. Kondor, Neuwied, vendis glumarkojn "Helpu al la lepruloj" jam por pli ol 5 500 GM. Pli ol 564 GM li enspezis por la IKUE-glumarkoj (Ĉenstoĥova-kongreso).

Vojaĝaj salutoj

Post vizitoj de la famaj kasteloj ĉe la Loire kun renkontiĝo kun gesinjoroj Bermonde en Angers mi sendas al vi kaj ĉiuj legantoj de Pilo-Press korajn salutojn el St. Michel ĉe la maro en Normandio, Francio. Via F.W. Poppeck, Oberkirch, F R Germanio.

Teorio de Esperanto

Iltis, Saarbrücken, reeldonis, libron "Teorio de Esperanto" de V. Vrankin, kies unua eldono aperis en la jaro 1929. El la enhavo: Enkonduko de la teorio de la internacia lingvo; Genealogia klasifiko de lingvoj kaj etimologio de la E-a radikaro; Fonetiko de Esperanto; Morfologio kaj Sintakso de Esperanto. Prezo 9,-- GM. Mendebila ĉe Ludwig Pickel, Libroservo, Postfach 2113, D-8500 Nürnberg 1.

Libro de la semajno (speciale por germanlingvanoj!)

Weltsprache und Weltwirtschaft (Mondolingvo kaj Monda Ekonomio)
Disertacio de Friedrich Leidinger 1924, Eldonita de Triksini,
prezo 10,- GM + 1,20 GM sendkostoj!

Mendu ĉe Ludwig Pickel, Libroservo, Postfach 2113, D-8500 Nürnberg 1
Postscheckkonto Nürnberg 819 56-851

Esperanto en Radio

Varsovio. La pasinta Esperanto-Ekspresso estis sub la signo de la Esperanto-gazetaro. El la revuo Esperanto n-ro julio-aŭgusto estis prezentita la completa artikolo de Gaston Waringhien "Naŭdek jarojn poste..". Estis cititaj artikoloj el Heroldo de Esperanto kaj Eŭropa Esperanto-Revujo. Aŭdiĝis ankaŭ la unuaj epigramoj de Jan Klimek laŭ Pilo-Press kaj la "Verda Simio" inaŭguris la "Esperanto-Necesejon". Demando: Ĉu, ju pli da E-necesejoj, des pli da esperantistoj aŭ ju pli da esperantistoj, des pli da E-necesejoj. Sociologia problemo!? - La Esperanto-anguleto kadre de la germanlingva programo denove citis el Pilo-Press. - La redakcio anoncas novan konkurson! Politikaj temoj: Egaligo de la deficiĉto de bona volo (Beogrado); La urĝegaj problemoj de Afriko k.a. -

Vieno. "La mondo ofte mezuras per malsamaj mezuriloj. Ekzemple: dum oni brue akuzadas la sud-afrikan politikon rilate al la nigrujoj, oni trankvile toleras la fifarojn de Idi Amin! Jen alia alia ekzemplo: Beogrado riproĉas al Aŭstrio la kapnombradon de ĉia slovena malplimulto en Suda Karintio. La sama Beogrado postulis de Sofia kapnombradon de la macedonoj, kiuĵ loĝas en Bulgario." Citaĵo el la semajna komentario de D-ro Alfred Macher.

Vatikano ĉiam estas bone aŭdebla. La geparolistoj estas: Pastro Jacobitti, Elisabetta Puracchio kaj Bruno Valentini.

Romo malgraŭ perturboj kaj intervenoj tamen estas aŭdebla kaj iomete komprenebla.